

Packonferencoj

— Georgo Verda —

Por kiu oni ludas la komedion en Genevo, Parizo, Berlino kaj Londono? Kiun jam ĝenerale interesas la diplomataj konversacioj, riverencoj kaj reciproka flatado? Kiu ankoraŭ, krom la oratoroj mem, kortusiĝas pri tiuj emfazaj paroladoj kaj promesoj, kiujn la ĉefurboj konigas al la mondo per paktoj kaj telegrafagentejoj? La spektaklo jam tedas kaj la publiko jam delonge endormiĝis. Kaj oni ricevas la impreson, ke la aktoroj en sia fervoro tute forgesis sin, ke ili ludas el la nura deziro ludi, ke ia vanteco kaptis ilin ĉiujn, kaj ili reciproke eĉ aplaŭdas unu la alian.

Kien foriĝis la influo, kiun tiuj kleraj diplomatoj devis elporti el la mondfamaj universitatoj, kie ili studis la plej grandajn kaj plej noblajn pensulojn kaj filozofojn de l' homaro? La mondmilito estis ja la plej bona lernejo, sed la kugloj kaj grenadoj tro forte kontuzis la kapojn de la studantoj, kiuj ne kapablis aŭ ne volis konkludi la valoron de la ricevitaj instruoj. Teruro inundas la koron, kiam oni konsciigas al si la senrespondecon de tiuj, kiuj svingas en siaj manoj la mondon kiel ludilon.

Kiam oni observas ĉion ĉi, kio okazas sur la malgranda kompatinda terglobo, tiun reton de grandiozaj intrigoj, en kiujn unu implikas la alian, tiun senhontan arogantecon, kun kiu pri la paco parolas homoj, kies nura misio estas semi ruinon kaj panikon, tiam vole-nevole venas en la kapon la penso, ke verdire ni, naivaj pacamantoj, naskiĝis en neĝusta tempo, aŭ almenaŭ obsediĝis de malbonaj, malutilaj, danĝeraj influoj. Kaj ni volus malbeni ĉiujn poetojn kaj filozofojn, kiuj forĝis en niajn mensojn stultajn instruojn pri homaro, kaj disflamigis en niaj koroj malsaĝan amon al la paco. Kiu do bezonis ilin, tiujn Sokratojn kaj Tolstojojn kaj kial oni ne bruligis tiujn spiritajn kriplulojn tuj kiam iliaj unuaj vortoj estis konigataj al la mondo? Nun oni provas bruligi iliajn librojn sur publikaj ĉefurbaj placoj! Tro malfrue. La gangreno, kiun tiuj frenezuloj semis, alkroĉis sin al niaj animoj kaj dismordas ilin senkomplete. Ni estas perditaj senespere.

Ni devas adapti nin al la racio reganta la nunan

epokon. Ni devas klare ekkompreni, ke packonferenco ne signifas laŭvorte kunvenon de bonvolemaj homoj, kiuj serĉas la pacon. Tiel same, kiel ĉiu nova kanono aŭ militŝipo devas esti konsekrate de pastro, kiu en nomo de homamo benas ĝin, tiel same la t. n. packonferenco estas nur laŭmora ceremonio, kiu antaŭiras novan konflikton aŭ konstruadon de kelkdek novaj militŝipoj kaj kelkcent kanonoj. Tia rito ili estas, tiuj packonferencoj. Kaj se vi tiamaniere perceptos ilian esencon, tiam ili ne senluziigos vin, nek tedos vin, sed kontraŭe: ili ĉiam vigle amuzos vin, kiel ekz. ĉiu pompa defilado. Kaj ne forgesu, ke oni ne povas tute sen vorto, sen antaŭa festenado aranĝi konflikton aŭ deklari militon. *Noblesse oblige*. Por provoki skandalon oni kutime antaŭe trinkas iom da brando, kuraĝigas la animon k. t. p. Ne zorgu — la skandalo jam eksplodos de si mem, spontane.

Jam delonge pasis tiu tempo, kiam tiaj homoj, kiel Emile Zola kaj Leo Tolstoj kapablis skui ĝisfunde la konsciencon de l' mondo. Hodiaŭ oni scias, ke »konscienco« estas elmodiĝinta arkaikajo aŭ ĝenerale iluzio, trompanta kaj deloganta la homojn. Kaj se ĝi eĉ ekzistas, nenio kapablas skui ĝin pli forte ol novtipa kanono kaj militŝipo. La mondo ne estas ja freneza: se oni en tiom abunda amaso pligrandigas la armilaron, oni ja scias, kion oni faras!

Packonferenco estas tia kunveno internacia, en kiu reprezentanto de unu ŝtato konsilas al la reprezentanto de alia ŝtato, ke ĝi — tiu alia ŝtato — senarnigu sin. Kaj diplomato estas tia homo, kiu kun eksterordinara mildeco kaj pacienco aŭskultas, kion diras lia kolego, la reprezentanto de la alia ŝtato, kaj senprokraste sugestas al sia registaro la konstruadon de kelkdek novaj ŝipoj plej moderne ekipitaj. Kompreneble la dua diplomato ne restas malantaŭe kaj li ordonas starigi en sia ŝtato tiom pli grandan kaj fortan ŝiparon. Poste ambaŭ diplomatoj »interŝanĝas« dum temango ĉe la lazura bordo kelkajn parolojn de tre grava politika signifo kaj oni venas alla konkludo, ke pri la neebleco starigi la mondpacon kulpas kompreneble alia diplomato, la reprezentanto de la tria ŝtato...